



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

PILO-PRESS informas

ankaŭ dum la

sezono de kukumoj Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Subtenu Pilo-  
Press!

N-ro 25/75 4 jul 1975  
Aperas ĉiusemajne

### Grava leĝopropono favore al Esperanto

Paris (pp). SAT-amikaro, Laborista Esperanto-Asocio por franc-lingvaj regionoj, transsendis al ni fotokopion pri la leĝopropono N-ro 1667 al la Nacia Asembleo de Francio favore al la instruado de Esperanto en duagrada lernejoj.

La leĝopropono, kiun prezentis membroj de la grupo de la Socialista Partio kaj de la maldekstraj Radikaluloj, estis registrita ĉe la prezidantejo de la Nacia Asembleo la 16-an de majo 1975 kaj resendita al la Komisiono pri Kulturaj Aferoj. Sur paĝo 2 ni publikigas la tradukon de la propono.

La propono estas amplekse kaj detale motivigita. Entute ĝi ampleksas 6 paĝojn.

N° 1667

## ASSEMBLÉE NATIONALE

CONSTITUTION DU 4 OCTOBRE 1958

CINQUIÈME LÉGISLATURE

SECONDE SESSION ORDINAIRE DE 1974-1975

Enregistré à la Présidence de l'Assemblée Nationale le 16 mai 1975.  
Annexe au procès-verbal de la séance du 20 mai 1975.

## PROPOSITION DE LOI

*tendant à inclure la langue internationale Espéranto  
dans l'enseignement secondaire comme langue facultative.*

(Renvoyée à la Commission des affaires culturelles, familiales et sociales à défaut de constitution d'une Commission spéciale dans les délais prévus par les articles 30 et 31 du Règlement.)

PRÉSENTÉE

PAR MM. MEXANDEAU, BAYOU, BASTIDE,  
FRÈCHE, SÈNÈS, VIVIEN

et les membres du groupe du Parti socialiste  
et des Radicaux de gauche (1) et apparentés (2),

Députés.

Leĝopropoŝo N-ro 1667

Registrita ĉe la Prezidantejo de la Nacia Asembleo la  
16-an de majo 1975

Resendita al la Komisiono pri Kulturaj Aferoj

Prezentita de S-roj Mexandeau, Bayou, Bastide, Frêche, Sénès,  
Vivien kaj la membroj de la grupo de la Socialista Partio  
kaj de la maldekstraj Radikaluloj.

\*\*\*\*\*

Unua artikolo

La lernado de la Internacia Lingvo nomita "Esperanto" estas  
akceptata kiel fakultativa lernobjekto en la programoj de la  
duagrada instruado.

Dua artikolo

En la ekzamenoj akceptantaj unu aŭ plurajn provojn de fremdaj  
lingvoj, la Internacia Lingvo "Esperanto" estas aldonita al la  
listo de fremdaj lingvoj sur kiuj povas baziĝi tiuj provoj.

Tria artikolo

La instruado laŭelekta de Esperanto estiĝos progresive en la  
publikaj Instru-Establoj de la ŝtato; ĝi okazos ĉiufoje, kiam  
ĝi estos petita, kaj kiam ekzistos kompetenta profesoro.

Kvara artikolo

La ekzamenaj provoj estos enkondukitaj ĉiufoje, kiam la ekza-  
menantaro povos aligi al si kompetentan ekzamenanton.

Kvina artikolo

Por la instruado kaj por la ekzamenoj, la kandidatoj profitos  
el la samaj rimedoj kaj el la samaj avantaĝoj konsentitaj al  
tiuj, kiuj lernas fremdajn lingvojn.

Sesa artikolo

La formado de la profesoroj estos realigata per organizo de kursoj  
kaj de staĝoj funkciantaj en la kadro de la Supera Instruado, kiu  
liveros diplomojn atestantaj pri la kompetenteco de la profesoroj  
kaj eksamenantoj. La transira periodo estos aranĝata laŭ regle-  
menta vojo.

Sepa artikolo

Provizore, dum la komenca periodo, la Ministerio pri Edukado  
povos konsulti la privatan organizon nomitan "Institut Français  
d'Espéranto", kiu ĝis nun organizis la ekzamenojn kaj liveris  
la diplomojn.



Prof. d-ro Furler mortis

Oberkirch(pp) En la aĝo de 71 jaroj mortis prof. d-ro Hans Furler, iama prezidanto de la Eŭropa Parlamento kaj batalanto por la nova Eŭropo. Sian simpatian por Esperanto prof. Furler montris per tio, ke li kelkfoje eniris la honoran komitaton de Esperanto-kongresoj, laste de la 53a Germana Esperanto-Kongreso en Oberkirch, majo 1975. Okaze de la malfermo de tiu kongreso li esprimis sian optimismon pri la estonta evoluo de Eŭropo kaj pledis por la rekta elekto de la membroj de la Eŭropa Parlamento. Tiuj vortoj dum la Esperanto-kongreso fakte estis lia lasta publika parolado. En letero de la 24.2.69 la mortinto skribis al la iama sekretario de GEA, Ludwig Pickel: "Vi scias, ke jam de longe mi sekvas la Esperanto-evoluon kun bonvolo kaj intereso."

Feriorenkontiĝo en Chiavari

Paderborn (pp) La Eŭropa Klubo planas por la somero 1976 aranĝi Eŭropan Feriorenkontiĝon en Chiavari ĉe Ĝenovo/Italio. Krom gejunuloj el diversaj eŭropaj landoj partoprenos ankaŭ infanoj el la element-lerneja aĝo-ĝtupo, parte kune kun iliaj gepatroj. Tiuj ĉi infanoj tiam estos havintaj unu kaj duonan jaron da Esperanto-instruado, du lecionojn posamejne, parte pere de la instruaŭtomato Robbimat II.

La celo de tiu renkontiĝo estas montri ke ĉi-maniere ankaŭ infanoj germanaj, italaj, francaj, anglaj, nederlandaj aŭ danaj povas jam bone interkompreniĝi, se ili trapasis unu kaj duon-jaran instruadon.

En Paderborn momente partoprenas 120 elementlernejaj lernantoj tian planlingvoinstruadon. En Okcidenta Berlino tiu instruado komenciĝos en septembro provizore en unu lernejo. Krome la Eŭropa Klubo okazigos Esperanto-kursojn en la instrumaŝina salono de la Instituto pri Kibernetiko ĉe la Pedagogia Altlernejo en Berlin-Lankwitz, Malteserstr. 74-100. Direktoro de la instituto estas prof. d-ro Uwe Lehnert; li estas la Berlina reprezentanto de la Eŭropa Klubo.

Estus rekomendinde, se infanoj 8-12-jaraj el laŭeble multaj landoj konsiderus partoprenon de tiu ĉi sufiĉe novaŝpeca porinfana aranĝo. Interesuloj skribu al: Eŭropa Klubo, Riemkestr. 62, D-479 Paderborn.

Salutojn el Miedryzdroje de la Va Esperanto-Feriado

sendis Andrzej Pettyn, redaktoro de la Esperanto-redakcio de Pola Radio. Telegramstile li informis: Partoprenas 132 esperantistoj el Nederlando, Svedujo, GDR, Ĉeĥoslovakujo, Hungario, Bulgario kaj Pollando. Programo miksitaj: kultura-turisma-kursa. Instruas: Olle Olsson, Svedujo; Janina Crevaszkiewicz kaj A. Pettyn, Pollando. Ekskursoj, prelegoj, Esperanto-kantoj.

Pliaj salutoj:

El sia ĉi-jara libertemploko Gdansk salutis Roman Wiktar Rutkowski, Bydgoszcz. Li informis, ke la 75-05-23 aperis n-ro 100 de konstanta informrubriko Esperanto Dziś (Esperanto hodiaŭ) en la gazeto Dziennik Wieczorny, Bydgoszcz.

El Mississauga, Ontario, Kanado salutas s-rino Margarete Schmid, Augsburg, kiu restadas ĝis fine de aŭgusto ĉe familio Eichholz kaj helpas iom en la vortara laboro (Duden Bildvortaro).

## Esperanto en la radio

Varsovio. Mi jam pensis, ke Andrzej Pettyn post sia transiro al la finna redakcio estas perdita por la Esperanto-redakcio. De kelka tempo oni ne plu aŭdis lian voĉon aŭ liajn kontribuaĵojn. Sed mia supozo ne estis ĝusta. Li reaŭdigis kaj parolas ankaŭ la radian ĵurnalon, kiel ni povis konstati. Li ankaŭ sekvis sian kutimon informi je la fino de la "sciigoj" pri novaĵoj el la Esperanto-movado, ĉi-foje el Turku. Cetere Finnlando! Tiu lando tenas ĉiam ankoraŭ la pinton en la nombro de korespondaĵoj. En Junio alvenis 110 leteroj el Finnlando - kompreneble dank' al la "finna kolono". El FRG venis 23 korespondaĵoj, per kiu nombro FRG tenas la unuan lokon el la okcidentedropaj landoj ne kalkulande Finnlandon. Tamen estas landoj kun organizita Esperanto-movado el kiu venis nur 1 letero dum tuta monato. Entute dum junio alvenis pli ol 300 korespondaĵoj.

Longan tempon oni ne plu aŭdis la voĉon de Mariusz Dastych, kiu ja transiris al la dana redakcio. Ankaŭ Piotr Rowinski rarisgis. La ĉefan parolan laboron faras nuntempe Jerzy Grum, L. Szowalski kaj Barbara Pietzrak.

Berno. S-ro Gacond lasttempe intervjuis du aktivulojn de la svisa Fervojistia Esperanto-societo, s-roj Hunkele kaj Glättli. S-ro A. Baur ĉiam elektas interesan temon, lastfoje ekzemple pri la protestdemonstracioj kontraŭ la atomreaktoro en Kaiseraugst aŭ pri la aventurriĉa vivo de Sutter, svisdevena usona "generalulo". La tagmezaj elsendoj de Bern ĉiam estas bone aŭdeblaj.

Romo. La alfluo de korespondaĵoj al Romo ŝajnas esti tre kontentiga, ĉar fakte dum ĉiu dimanĉa elsendo oni citas el leteroj de korespondantoj. Tio estas tre ĝojiga fakto. Ĉu eble la sinteno de esperantistoj al "siaj" Esperanto-elsendoj pozitive ŝanĝiĝis? - Ni publikigas citaĵon el letero de prof. d-ro Richard E. Wood, Garden City, Usono: "Nome de la parolantoj de Esperanto en Usono, kaj aparte de la instruistoj de lingvoj kaj internaciaj studoj en ĉi tiu lando, mi petas vin en viaj elsendoj estonte pli atenti ankaŭ la amerikanan kontinenton. Mi povas kapti viajn elsendojn por Nordeŭropo nur dank' al tre forta, profesia ricevilo, alta ekstera anteno, longa persona sperto kaj klopoĉado; kaj tiam, nur malforte, je tre nekonvena horo por ĉi tiu kontinento, kaj kun forta interfero.

La frekvencoj de via nuna servo por Ameriko estas bone aŭdeblaj; necesas nur ŝanĝi parton de la elsendotempo de iu alia lingvo al Esperanto. Mi sugestas, ekzemple, ke vi sekvu la ekzemplon de la okcidentgermana stacio "Deutsche Welle", kiu ĵus abolis la anglalingvan elsendon por Nordameriko, konstatinte, ke neniu aŭskultas ĝin. Mi estas teknika oficiala konsilanto pri frekvencoj por uzo dum la amerika sendoservo de multaj internaciaj stacioj (Vatikana Radio, Deutsche Welle, Belga Radio, Japana Radio, Sudaŭfrika Radio, ktp), kaj tre volonte mi proponus taŭgajn aŭskultohorojn kaj frekvencojn. Mi esperas, ke baldaŭ mi povos pli facile informiĝi pri Italujo per forte aŭdeblaj esperantaj elsendoj je konvena horo."

Vieno. Ĉi-foje la dimanĉ-matena elsendo estis pli bone aŭdebla ol la sabatovespera. Ĉiam interesaj estas la semajnaj komentarioj de d-ro Alfred Macher, kiu ĉi-foje temis pri la aŭstria ekonomio. La kulturalan parton de la programo plenisgis artikolo de d-ro Karl Beckmann pri la preĝejo de Germana Kavalira Ordeno en Vieno. Vieno ricevis dum koncerna semajno 13 alskribojn el Anglio, Aŭstrio, FRG, Hungario, Italio, Nederlando, Svedio kaj Sovetunio. Interesuloj povas ricevi senpage ekzempleron de la priparolita broŝuro "La ergokrata Evangelio". Skribu do al Esperanto-Redakcio de ORF, Poŝtkesto 700, A-1041 Vieno.